Sennaciulo


Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Majo 1999 — 70-a jaro, n-ro 5 (1127)

ISSN 1163.0442 — *Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem* — MENSUEL/MONATA

1-A DE MAJO

INTERNACIA TAGO DE LA LABORISTOJ !



PRI BILLY WALDON

Daŭre, kun multaj malfacilaĵoj, la PK de SAT kolektas faktojn, dokumentojn, donitaĵojn pri la “afero Billy WALDON”. Jam ni dankas ĉiujn geamikojn, gekamaradojn, kiuj helpis tre serioze la SAT-PKon. : Wim HARMON, Jacqueline LEPEIX, Henriko MASSON, la pastron REGAN, Gary MICKLE, Thomas BORMANN, Helga kaj Johano RAPLEY, ne forgesante “Heroldon de Esperanto” kiu “reaktualigis la aferon”.

La PK de SAT ricevis ankaŭ negativan kritikon pri sia agado (por aperigo en S-ulo!) kaj evidente ni ne publikigos tiun tekston.

Pri venonta publikigo de la materialo akumulata, verkado de dosiero, ktp, la SAT-PK iniciatos NUR kiam ĝi estos certa ke tio ne povas endanĝerigi la situacion de Billy, kaj ni faros nenion sen lia konsento.

La SAT-PK lanĉas alvokon por ke ĉiuj kiuj posedas precizajn informojn pri Billy (datojn, lokon de kunveno aŭ renkontiĝo, partoprenon al aranĝoj, ktp), precipe pri la periodo de januaro 1980 ĝis decembro 1985, bonvolu sendi ilin al la SAT-sidejo. Plie interesas nin informoj (teksto, ĉarto, ktp) pri la asocio INCOMINDIOS.

Anticipajn dankojn,

La PK de SAT

SAT SUR TTT :http://multimania.com/satesperanto

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

EL LA REDAKTEJO....

Karaj geamikoj,

kiel vi povas konstati, tiu ĉi numero estas pli ampleksa ol kutime (16 paĝoj), ĉar en ĝi troviĝas la unua parto de la rezulto de nia Opinienketo. La dua parto aperos en junia numero.

Krom tio, la milito en Nova Jugoslavio provokas diversajn reagojn kaj ni invitas ĉiujn niajn legantojn libere esprimiĝi, tamen ĉiam restante serenaj. La debato estas lanĉita. Sekve, sendu al ni viajn opiniojn pri tiu milito, ĉar ni konscias ke niaj membroj kiel ankaŭ aliaj personoj havas tre diversajn opiniojn.

Alproksimiĝas nia kongreso en Karlovy Vary. Ne atendu la lastajn tagojn por aliĝi kaj por kontribui al la estonto kaj al la bono de nia asocio. Ĝia vivo kaj utilo dependas de la aktiveco de niaj membroj.

Plej kamaradece via,

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@cybercable.fr.
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 51,70 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Oficiala komuniko

Sekve de kunveno de la parizregiona SAT-Rondo, kiu okazis la 6-an de februaro 1999, kaj en kiu estis proponitaj la kandidatoj por la PK, por la Ĝenerala Konsilanto en la sideja urbo kaj la kasrevizoroj, okazis skriba referendumo, konforme al la regularo. Ĝin partoprenis 62 membroj (6 nevalidaj por la PK kaj 10 nevalidaj por la kasrevizoroj). La voĉdonilojn nombris kaj kontrolis ge-kdoj G. Querard kaj G. Lebec. Jen la rezulto de tiu baloto:

1. Por la Plenum-Komitato :	**Jes**
K-do R. Ballaguy	41
K-do J. Bannier	42
K-do K. Barkoviĉ	54
K-do G. Cavalier	50
K-do V. Charlot	23
K-do F. Gabalda	42
K-dino H. Gauducheau	28
K-dino L. Grandière	35
K-do A. Legros	20
K-do Y. Peyraut	45
K-dino T. Sabatier	49

Sekve estas elektitaj 8 jenaj gekamaradoj: Ballaguy, Bannier, Barkoviĉ, Cavalier, Gabalda, Grandière, Peyraut kaj Sabatier.
La okmembra nova P.K. estos prezentata unue en la venonta Sennaciulo, poste al la Kongreso en Karlovy Vary kaj fine al Referendumo de la tuta membraro (ekde novembro 99) konforme al la paragrafo 10 de la Statuto. Neniu alia urbo proponis kandidatojn.

2. Por la Ĝenerala Konsilanto:	**Jes**
K-do Jean Selle	50
Nevalidaj 10	

3. Kasrevizoroj:	**Jes**
K-do R. Bulcourt	49
K-do C. Billard	47
K-dino R. Meurant	51
Nevalidaj 10	

La elekto de k-do Jean Selle kiel Ĝen. konsilanto de la sideja urbo kaj de kasrevizoroj, estas jam defintiva por la periodo 2000-2003.

RIPETA ATENTIGO

SAT havas novajn retadresojn pro transiro al Internet per kablo. Tre baldaŭ la malnovaj adresoj ne plu funkcios. Bonvolu do noti la novajn :

satesper@cybercable.fr
kaj
satesperanto@multimania.com

TTT: http://www.multimania.com/satesperanto

Boontje (Louis Paul Boon)

Unua de majo

Nun mi devus skribi per mia plej bela plumo, mia somera plumo, mia dimanĉa plumo. Ornami ĝin per ruĝa bendeto, kaj trempi ĝin en inkon per kiu skribiĝas nur vortoj de gajo, de suno kaj feliĉo, de libereco kaj gajanimeco;

Bedaŭrinde tiu estas plumo al kiu mi ne kutimas. Mi skribas per ĝi kiel mi poste ankaŭ kunmarŝos en la procesio: iomete fremda, iomete perdita en la festĝojo.

Pardonu min.

Granda ĝojo kaj granda feliĉo ĉiam igas min iom silentema. Mi pinĉas la brakon por scii ĉu mi ne sonĝas. Mi vidas tiom da flagoj en la manifestacio kaj mi scias ke estas mia propra flago: la flago kiun mi sole ĉiam portas en mia koro, tagon post tago.

Mi tiam spertas denove, la unuan de majo, ke mi ne estas sola, ke mi ne tutsola batalis por havi iom da vivoĝojo, por iom da justeco inter ni, por pli bela dometo, kaj afabla edzino kiu ne estas elĉerpita de tro da laborhoroj.

Tio emocias min. Ne ĉio estis vana, mi silente ekpensas, profunde en mia koro. Centoj, miloj, milionoj tra la tuta mondo, pensas kiel mi, portas tiun saman flagon en la koro. Kaj la unuan de majo, la plej bela tago de la jaro, ili venas eksteren kun tiu flago kaj marŝas en procesioj, ĉie, en Parizo kaj en Moskvo kaj en Londono, kaj en mia propra vilaĝeto Waaiendijck.

Ĉie estas homoj, kiuj pensas same kiel mi, kiuj same kiel mi rikoltas la fruktojn de tio, kion niaj gepatroj efektivigis: la 8 horan tagon, la 5 tagan semajnon, la pagatajn feriojn. Kaj tio estas nur kelkaj videblaj aferoj, kelkaj konkretaĵoj.

Car la resto estas multe pli. La libereco skribi kion mi pensas, la rajto esti kiu mi estas, kaj povi rigardi al reĝo, imperiestro aŭ papo kun la manoj en la pantalon-poŝoj. Ne devi depreni mian ĉapeton kiam mi ne emas fari tion, ne devi surgenuiĝi kaj petegi por panpeco aŭ loketo en la ĉielo.

Ni ne plu devas petegi, ni mem akiris ĉion.

Pro tio miloj kaj miloj marŝas unu apud la alia, sub la ruĝa flago de la unua de majo. Mi fakte devus jubili, mi scias, sed mi tro emociiĝas kaj mi eksilentas: pro respekto al mi mem.

Morgaŭ, postmorgaŭ, mia flageto kuŝos denove kunfaldita, profunde en la poŝeto de mia koro, sed hodiaŭ ĝi estas malfaldita kaj flirtas, ruĝa, ruĝa, ruĝa, en la tuta mondo.

Trad.Progresema Esperanto-Forumo
Jakvo Schram

Esperanto, motorciklo. kaj sennacieco

En franca revuo dediĉita al la uzado de motorciklo aperis artikolo sub la titolo: “Un moto-club espérantiste dans la FEMA - Bien se comprendre pour bien se défendre”. (Esperantista motorcikla-klubo en la FEMA*. Bone interkompreniĝi por bone sin defendi). Ĝi rakontas ke belga esperantisto, André RAMBEAUX, kreis Esperantistan motorciklan klubon, por ke la “rajdantoj” povu interkompreniĝi en Eŭropo, aplikante la devizon : “VIVU LA SENLIMA MOTORCIKLO!” La kreinto jen difinas sian projekton:” Mi provas kunigi personojn kiuj konscias pri tri idealoj : motorciklistan idealon, esperantistan idealon kaj liberecanan idealon..”

Por efike propagandi André RAMBEAUX partoprenas multajn raliojn kun flageto kiu portas la esprimon: “Sennacieca Grupo”

Oni povas kontakti lin ĉe la adreso:
André RAMBEAUX
27, la Fagne de Chimay
BE-6460 CHIMAY
Belgio
Tel: 00.32.(0)60.41.21.60
retadreso:

*Féderation européenne des Associations de Motocyclistes - Eŭropa Federacio de motorciklantaj asocioj.

Forumo de la Pakto pri Esperanta Civito en Karlovy Vary

Por respondi al multaj demandoj adresitaj al la SAT-sidejo, la Plenum-Komitato de SAT precizigas ke :
* ĝi ne invitis tiun organizon kongresi kadre de la SAT-kongreso en Karlovy Vary
* ĝi akceptis ke tiu organizo kongresu paralele al la SAT-Kongreso, sub sia nura kaj kompleta respondeco.
(vidu Sennaciulon, marto 1999)

La PK de SAT

NEKROLOGO

Ni ĵus eksciis ke en Mirkovci (HR) mortis nia malnova membro, kamarado

Marko PETROVIĈ
(matr. 32.201)

Li ofte kunlaboris per siaj engaĝitaj poemoj en Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo.
Ni kondolencas al liaj familianoj kaj geamikoj.

***

En Bruselo (BE) ĵus mortis 94-jara, nia malnova membro, k-dino

Marguerite HERMAN
(29.693)

Ni kondolencas al belgaj SAT-anoj kaj SAT-Amikaranoj.



Klasbatalo...ĉu tio ankoraŭ ekzistas ?

Laŭ «Interŝanĝoj kaj Movado»

AŬTOMOBILO

Francio
15/9/98 - Novaj uzinoj, novaj strikoj. Mil laboristoj de la modernega uzino fabrikanta la Smart-aŭtomobilon en Hambach (Mozelio) de la societo Micro-Compact-car ĉesigis la muntadĉenon dum du horoj pro laborkondiĉoj kaj salajroj.

KONSTRUADO

Irlando
3/10/98- Centoj da konstrulaboristoj starigas strikpostenojn antaŭ la enirejo de la tribunalo (kaj provas ĝin invadi) por atingi la liberigadon de unu el ili, arestita pro partopreno en strikposteno antaŭ la sidejo de konstruentrepreno malgraŭ edikto de la sama tribunalo ordonanta la forigon de la strikpostenoj : li fine estas liberigita sen kondamno kaj sen esti senkulpiĝanta ĉe la tribunalo pro «comptemet of court» (malrespekto al la tribunalo, kio estas konsiderata kiel delikto).

Britio
31/10/98 - Ĉar la konstruado de la plilarĝigo de la «Jubilee line» de la londona metroo (kiu estas malfermiĝonta por inaŭguri la 2000-an jaron) malfruas je preskaŭ unu jaro, la usona firmao Bechtel, kiu zorgas pri la elektra ekipado provas trudi al la elektrikistoj 48-horajn semajnojn, kio estigas novajn laborĉesojn kaj eĉ sabotadojn.

KOMUNIKADO

Novkaledonio
18/11/98 - La laboristoj strikantaj por salajroj kaj postengarantio ĉe novaj teknikoj okupadas la presejon de Nouvelles calédoniennes (kaledoniaj novaĵoj - 120 laboristoj, inter kiuj 30 ĵurnalistoj) kaj iliaj strikpostenoj pro tio ĉesigis la elsendojn de radio, kiu okupas la saman konstruaĵon. Ĉio tio kun fono de politika konkurenco inter la francdevenuloj kaj la kanakoj en la perspektivo de la sendependiĝo. Interkonsento farita la 19/11/98.

Portoriko
7 kaj 8-an de julio 1998 - Ĝenerala dutaga striko pro alvoko de la sindikatoj lamigis tiun insulon de 3,5 milionoj da loĝantoj, regatan de Usono. Tio estas la unua ĝenerala striko de post la 30-aj jaroj, pro la amplekso de la ekonomia krizo, malgraŭ ke la pretekstoj estis lukti kontraŭ la privatigado de la loka telefonkompanio (6400) vendita al la usona trusto GRE. Interbatiĝo kun la polico kaŭzis dekon da vundoj, sabotadojn de instalaĵoj. La etoson ekspluatis la sendependistoj ĉe fono de negocado kun Usono.

Britio
21/10/98 - Pli ol 10000 salajruloj de BBC strikis dum tri horoj por la salajroj (propono 4% por la malsupro de la skalo, 9% por la supro), blindigante diversajn programojn ĉe la britaj ekranoj.

Francio
24/9/98 - Strikoj ĉe Radio France subtenata de 4 sindikatoj pro problemoj de organizado, programoj kaj salajroj koncernantaj aparte la enkondukon de novaj teknikoj.
19/10/98 - Ducent poŝtistoj strikantaj ĉe la ĉefa poŝtejo de Remso blokas la centron : 13 postenoj kreitaj.
24.10.98 - Okupado de departementa direktejo de la poŝto en Cergy (okcidenta suburbo de Parizo) pro alvoko de CGT kaj Sud PTT kontraŭ la planita maldungado de 7 poŝtistoj pro ilia partopreno en striko en la lasta septembro. Interkonsento por reveni al la komenca situacio.
19/11/98 - La 50 leterportistoj de Arlezo revenas al la laboro post 55-taga striko, akceptante interkonsentojn pri la 35 horoj, la dungado kaj la pagado de 11 striktagoj.

Alvoko de anglaj kamaradoj

En la franca gazetaro (verŝajne en aliaj ankaŭ) aperas, de tempo al tempo, artikoloj pri la fakto ke en Britio multaj leĝoj "bremsas" la agadon de la sindikatoj. Interalie la nuna registaro de Tony Blair, pligravigas la situacion. Tio ne konsistas britan escepton. Ĉie, inkluzive en la tiel nomataj demokrataj landoj, la registaroj kaj la kapitalistaj fortoj provas maloftigi la sindikatan agadon. Sed ĉiu nacio havas sian apartan situacion. Pro tio, ĉu niaj britaj kamaradoj povus verki artikolo(j)n pri tiu temo? Poste povos atingi la redakcion de Sennaciulo artikoloj el multaj partoj de la mondo.

Y. Peyraut

Mortoj ligataj al la laboro

Laŭ depeŝo de la presagentejo AFP, citata de la gazeto "Le Monde" (13.04.1999), ĉiujare pli ol unu miliono da laboristoj mortas pro la laboro, dum centmilionoj da laboristoj estas viktimoj de akcidentoj aŭ submetitaj al danĝeraj produktoj, laŭ la Bureau International du Travail (B.I.T. - Internacia Buroo de la laboro), kies sidejo estas en Ĝenevo.
Tiu organizo okazigas sian venontan kongreson en Sao Paulo (Brazilo). Dum tiu kongreso la BIT montros ke ĉiujare 250 milionoj da profesiaj akcidentoj provokas laborĉesigojn.
La fibro amianto (asbesto) respondecas pri 10.000 jaraj mortoj.
Dekdu milionoj da profesiaj akcidentoj trafas infanojn kaj kondukas al dekdu mil mortoj.

Kosovo - milito kaj etna purigado

„La tuta internacia Esperantistaro estas konsternita kaj hororigita pro la okazaĵoj en la Balkanaj landoj".

Krom la kruela mortigado de tiom da senkulpaj homoj, kaj la detruo de hejmoj kaj posedaĵoj, aparta kaj pli specifa perdo estas perdo de la vero, alia trafita viktimo. Ree memevidentiĝas ke tiuj, kiuj kulpas en tiaj aferoj, ĉiam provas influi flamigeble, aliajn mensoge, tro ofte sukcese.

Krom la hororo, kaj nia konsterniĝo, kiun do, ni devus kulpigi? Kion dirus Zamenhof se li ankoraŭ vivus?

Sendube, ne la odinarajn popolojn. Ili estas viktimoj, ofte ankaŭ iloj, sed ĉiam viktimoj. Pli bona demando estus, kiun avantaĝas sekve la kreo de tia situacio? Eĉ respondo al tia demando ofte ne sufiĉas por doni la tutan veron. Profesiaj generaloj, posedante ultramodernajn armilojn volonte kontribuas lude, provuzante tiajn armilojn. Ankaŭ ili kulpas eĉ pli grave kiam ili havas la proksimajn orelojn de la politikistoj.

Ĉu ambiciaj politikistoj rolas ekspluatante religiajn kaj malnovajn historiajn plendojn? Ĉu homoj tiaj povas esti tiom fiaj? Jes, ja, kiam ili akceptas siajn proprajn memkreitajn antaŭjuĝojn, tiam ili ja kulpas pleje, kaj klare meritas ricevi niajn plejfortajn kondamnojn, ĉar ili havas la potencon. Estas ili kiuj respondecas.

Estas ili kiuj preterpasis la Sekurecan Konsilion de la Unuiĝintaj Nacioj, la nun paralizita ĉefa internacia instanco, havanta la rolon preventi tiajn katastrofojn. Ne decas en Esperanta ĵurnalo mencii landajn nomojn. Ĉu rememorigo de la Ligo de Nacioj? Tamen, vere senleĝa skandalo.

Kio atendos nin?

Nepre, politika malstabileco en tiu parto de la mondo; longtempe rikolto de amara kaj longdaŭra memoro pri la maljustecoj kiuj okazis; malameco kaj venĝo atendos multajn, eĉ nin, kiuj ne estas envolvataj; terorismo, tia kia minace daŭros tra multaj generacioj. Niaj nepoj kaj nepinoj pagos por tio kion niaj regantoj okazigas al ni en la Balkana duoninsulo.

Ĉu tia analizo sufiĉas. Certe ne!

Ni devas klopodi kompreni pli bone, juste, kio okazis, kaj plej bone ripari la teruraĵojn jam okazintajn.

Ni ĉiuj pledu kaj aktiviĝu celante al tiu kiu havas la potencon, laŭte kaj ĉiam pli laŭte dirante al ili : ĉesigu la mortigadon, donu ŝancon al paco! Vivu la paco! Uzu la Unuiĝintajn Naciojn !

Kep Enderby, Prezidanto UEA.

KOSOVO - Kion fari ?

Kiam aperos ĉi tiuj linioj, eventuale jam finiĝis la milito en Kosovo. Oni povas ĉiam esperi...

La redakcio de Sennaciulo kaj la PK de SAT (kaj verŝajne la plej granda nombro de SAT-membroj) estas komplete senpovaj antaŭ tiu nova giganta dramo. Sed minimume povas okazi debato en nia gazeto, imitante la nunajn ĉiutagajn numerojn de la franca gazeto «Le Monde», kiu aperigas plurajn paĝojn de kontraŭdiraj opinioj.

Jam spontanee, en la aprila numero de S-ulo, k-do Henri Masson lanĉis tiun debaton. Aliaj same faru. Dum la SAT-Amikara kongreso kiu okazis la 3-an, 4-an kaj 5-an de aprilo, la «evento» Kosovo ne povis esti prisilentata. La ĝenerala sekretario de tiu laborista organizo prezentis tekston por ke ĝi estu eventuale akceptita post mallonga debato. Sed ĉiuj el la partoprenintoj konsciis ke «mallonga» debato ne povis realiĝi.

Dimanĉe je la 16h40 prezento de la proponita teksto :

Deklaro proponita al la 54-a kongreso de SAT-Amikaro (Glay - 3.4.5.-a de aprilo 1999)

La 54-a kongreso de SAT-Amikaro, kies laborlingvo Esperanto- naskiĝis de profunde humanista celo en etoso de interetna malamo, kaj kies laborkunsidoj estis influataj de la tragika evoluo de la situacio en Nova Jugoslavio :

- memorigas ke tiu konflikto komenciĝis per sistema propagando de demagogaj, naciistaj, ksenofobaj kaj rasistaj tezoj, kiuj, ĉie ajn, kondukis al barbareco;

- alvokas al plej granda prudento koncerne la manifestaciojn kaj poziciojn favore al la serba popolo kaj malfavore al la interveno de NATO kiu donos pretekston al la premreĝimo por daŭri kaj pravigi la daŭron de ĝia barbara subpremo;

- kuraĝigas la esperanto-uzantojn kontribui al la diskonigo de senpartiaj informoj, plifaciligi la kontaktojn inter dispartigitaj familioj, kaj favori iniciatojn cele al vasta interhelpa movado ĉirkaŭ la senkulpaj viktimoj de tiu konflikto;

- vaste disvastigi la "alvokon de Hodler" (vidu p.54 sub titolo «Super») kaj ĝin adapti je la nunaj cirkonstancoj por ke povu sin esprimi la konstruivaj kaj demokrataj fortoj, kiuj ekzistas en ambaŭ partoj same kiel ĉie en la Balkanoj.

Dimanĉe je la 16h45 kvin manoj leviĝis por peti parolrajton sin esprimi.

Dimanĉe je la 16h50 evidentiĝis ke malsamas la opinioj. La prezidanto petis la intervenintojn krei komisionon por prepari pli ellaboritan tekston. Akceptite.

Dimanĉe je la 17-a horo: fino de la 2-a laborkunsido.

Lunde je la 9-a precize: la raportinto de la komisiono informas ke estis neeble trovi sintezan pozicion.

Do tiu deklaro ne estis akceptita, sed la debato daŭras.

****

"SUPER"

Neniu popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco. Nur individuoj kaj la milito estas respondaj. En la ĉiutaga vivo, ĉe nia propra lando, ni renkontiĝas kun tiaj homoj, kiujn ni juĝas barbaraj, perfidaj aŭ stultaj. Eĉ la sama homo, ĉe iaj momentoj de sia vivo, montriĝas barbara, perfida aŭ stulta, same kiel ĉe aliaj momentoj li estas bona, humana kaj prudenta. Aldonu al tio, ke la milito malkovras kaj ekstremigas ĉiujn primitivajn instinktojn, kiujn laŭeble bridigis la socia vivo. Vi scias, kiel malfacile estas senpartie juĝi unu homon en unu el liaj agoj, vi scias, ke la milito transformas la animstaton de la homoj, kaj vi volas juĝi tutan popolon pro la agoj de individuoj regataj de instinktoj ne plu reteneblaj!

[...] Utile estas, ke kelkaj individuoj konservu prudenton kaj sin gardu kontraŭ la ekstremaĵoj de la popolamasoj. Tian rolon ni Esperantistoj povus havi. Pli bonan estontecon ni povos prepari, nur se dum la krizo ni estis sufiĉe fortaj por ne perdi niajn konvinkojn.

La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la bataltomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io... Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiajn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruado. Tiaj laboristoj estos la diversnaciaj elitoj, kiuj sen antaŭjuĝoj kaj en spirito de reciproka toleremo, altigos siajn rigardojn super la horizonto de la landolimoj naciaj, kaj konscios pri la harmonia civilizeco, sufiĉe larĝa por enteni ĉiujn naciajn kulturojn, sufiĉe tolerema por konsideri ilian diversecon kiel bonfara necesaĵo. Tiuj laboristoj ne malŝatos la militon; ili ĝin deklaros al la sistemo, kiu permesas kaj kaŭzas tiajn buĉadojn; ili ĝin deklaros al la antaŭjuĝoj, al la krudaj instinktoj, al ĉiuj hontoj, kiuj senhonorigas la homaron kaj kiuj restos ĉiam sufiĉe multaj por ke la estontaj generacioj ne timu malfortigan ripozon.

Ni, Esperantistoj, estu la embrio de tiuj estontaj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de bedaŭro.

La veran progreson ne kreis homoj, kiuj genufleksis antaŭ ĉiuj akceptitaj ideoj kaj blinde sekvis la popolamasojn. Ĝin kreis la homoj kun forta konvinko, kiuj sciis renversi la antaŭjuĝojn kaj transformi la opiniojn.

Hector Hodler, 1915 (el revuo "Esperanto")

BOMBADO DE NOVA JUGOSLAVIO FARE DE NATO
(daŭrigo pri la sama temo)

Neniu plago, kiun oni pretendas solvi per milito,
estas tiel granda, kiel la milito mem
(citaĵo)

Depost pli ol unu monato, sen iu ajn mandato de UNO, meminiciate je la instigo de la Usona registaro, NATO komencis bombadi Novan Jugoslavion.
La celo estis timigi Miloŝeviĉ, lin rapide cedigi post kelktaga «averto».
Tiel ne okazis, kaj, ĝis nun, la sola rezulto estas multaj ruinoj, nombraj viktimoj kaj granda malfeliĉo por la albana popolo de Kosovo; ne forgesante ankaŭ la ruinojn kaj civilajn viktimojn en Serbio. Neniu konas la eventualajn konsekvencojn de tiu milito. Kiel ĝi evoluos?
Ĉu la internacia komunaĵo devis fajfi pri tio, kio okazis en tiu parto de Eŭropo kaj lasi Miloŝeviĉ daŭrigi sian etnan purigadon ? Certe ne ! Sed estus aliaj rimedoj ol la milito, eĉ se ties efikoj ne estus tujaj.
Neniu moderna ŝtato povas vivi en aŭtarcio. Serbio ne povus longe elteni strategian ekonomian blokadon. Kial ne privilegii tiun solvon prefere al la milita?
Despli, ke ĉi lasta estis la preteksto, kiun uzis Miloŝeviĉ por reage pliampleksigi sian planon de etna purigado kaj provoki tiom da abomenaĵoj.
Sed, kion li faras rilate al la albanoj de Kosovo, tion same faras la izraelia registaro rilate al la palestinanoj; la turka registaro rilate al la kurdoj!
La volo de la albanoj de Kosovo daŭre loĝi sur sia praava tero, ĝui minimume certan aŭtonomion, estas memkomprenebla.
SAT-anoj, ne lasu nin mensmanipuli per ambaŭflankaj propagandoj kaj plene konsciu, ke la veraj profitantoj estos, kiel kutime, la armilvendistoj.
Ne al la milito !

Etienne,22.04.199

Franca - Serba amikeco

Tradicie, depost la unua mondmilito, kaj post la traktado de Versailles (1919) - kiu kreis la regnon de slovenoj, kroatoj kaj serboj - la francoj konsideras la serbojn kiel amikoj kaj reciproke.

Nun multaj serboj riproĉas al la francoj ke ili perfidas tiun malnovan kaj profundan amikecon.

Al tiu nova sento iu leganto de la gazeto "Le Monde", Raphaêl Visocckas, reagas skribante (resume): "De 1990, ni malkovras kun konsterno ke tiuj (serbaj) naciistoj ne vere ŝatas siajn slavajn fratojn de Vukovar, Sarajevo, Srebrenica, aŭ de Kosovo. Tiuj serbaj naciistoj opinias ke nome de nia malnova kaj ekskluziva amikeco, ni devas ilin lasi fari siajn malgrandajn ekstermadojn. Estas miskompreno: tiu franca-serba amikeco ne estis destinita ŝirmi ion ajn. Kaj tiun amikecon fakte perfidis tiuj serbaj naciistoj."

Resumita de Y. Peyraut, por kontribui al la debato pri balkanaj aferoj.

OPINIENKETO PRI SAT

Unua parto

De la komenciĝo de la februara monato, grupo de kvin parizregionaj gekamaradoj provas eltiri plej grandan "sukon" el la respondoj senditaj okaze de la "Opinienketo pri SAT", lanĉita dum la SAT-kongreso en Odeso. Tiuj gekamaradoj ne estas specialistoj pri sociala psikologio aŭ pri sociologio. Pro tio, eventuale, parto de la esenco de tiu ĉi enketo ne aperos.
64 SAT-anoj kaj 24 nemembroj partoprenis al tiu ĉi enketo. La SAT-anoj evidente povos legi tiun dosieron en Sennaciulo kaj la nemembroj ricevos ĝin perpoŝte (se ili indikis sian adreson) kaj ĝi aperos en la reto.
Tiu dosiero aperos en Sennaciulo en du partoj.
1) La unua parto en tiu ĉi numero entenas:
- ĝeneralan enkondukon;
- la tabelojn sur kiuj estas listigitaj kaj numeritaj la respondoj kiuj koncernas la "fermitajn" demandojn, t.e. tiujn al kiuj oni povas respondi per jes aŭ ne. Vi rimarkos ke por la demandoj 3-a kaj 4-a ni detalumis la kriteriojn uzitajn de la respondintoj.
- la prezenton de la respondoj al la "ne-fermitaj" demandoj fare de la ne-SAT-anoj. La plej granda parto de ili respondis kompreneble libere kaj spontanee kaj ni provis konservi la plej signifajn ideojn, opiniojn, proponojn, ktp. Interparenteze ni indikas la inicialojn de la nomoj kaj antaŭnomoj.
2) La dua parto aperos en la junia numero de Sennaciulo. Tiel la kongresanoj de Karlovy Vary povos utiligi ĝin kiel diskutdokumenton.
La prezento de tiu dua parto similos, por la respondoj al la "ne-fermitaj" demandoj, fare de SAT-anoj, al tiu de la prezento de respondoj fermitaj de ne-SAT-anoj.
La demandoj 6-a, 7-a kaj 8-a estis la plej malfermitaj. Kaj temis pri proponoj. Pro tio ni kelkfoje trovis respondojn en la netaŭga loko. Ni provis dum la analizo konservi la spontanecon. Ni ne povis simple kopii la respondojn. Ni esperas ke nia sintezo ne tro malriĉigis la enhavon.

RESPONDOJ DE NE-SAT-ANOJ

24 esperantistoj partoprenis tiun enketon, laŭ statistiko jene:
Brazilo 1, Belgio 1, Francio 13, Germanio 1, Italio 1, Kanado 1, Norvegio 1, Portugalio 1, Ukrajno 1, Usono 1, ? 2.
El tiuj 24 personoj, 2 esprimis senambiguecan kontraŭan sintenon al SAT: "Mi ne interesiĝas pri SAT ĉar laŭ mia sperto SAT ĉefe enhavas maljunajn francojn kiuj krokodiladas" (K.G.) kaj: "Ni dissolvu la asocion por ne malŝpari niajn fortojn" (Z.S.)
Feliĉe, aliaj reagoj estas iom pli pozitivaj. Ni vidu ilin demandon post demando:
- Unua demando: **"Kion vi scias pri SAT?"**
En tiu tre fermita demando, estas normale ke ne multiĝis la komentoj (ekster la frazo de K.G.).

* SAT estis kreita por klasbatalo;
* Oni diras ke SAT baldaŭ fariĝos fakasocio de U.E.A. (A.F.)
* Klasika mikso kun SAT-Amikaro (J.J.K., F.L.J.)

- Dua demando : **"Ĉu SAT estas ankoraŭ necesa ?**
Nur du personoj respondis negative.
Sola komento: "Jes, sed kondiĉe ke SAT pliradikaliĝu" (F.M.)

Tria demando : **"Kio interesas vin ĉe SAT kaj kial?"**
* Ĝia peresperanta karaktero (H.D.),
* Ĝiaj debatoj (D.)
* Ĝiaj engaĝemo kaj klarvideco (B.M.)
* Ĝia familieca etoso
* Kontaktreto kun alilandaj maldekstruloj (G.C.)
Sed:" Mi estas pli interesata pri U.E.A." (M.L.)
aŭ inverse: Pro sia malradikaliĝo SAT farigas malpli interesa kaj alloga" (F.M.)

Kvara demando: **"Kio malplaĉas al vi ĉe SAT ?"**
Finfine, eventuale, tiu demando estas la plej grava en tiu ĉi enketo. Ĉar estas tre interese scii tion kio malplaĉas al ne-SAT-anoj en SAT. Eventuale koni la kaŭzojn de ne-aliĝo al SAT... kaj fakte, jen tuta listo de malplaĉoj:
* ŝajn-konkurenco kun U.E.A. (J.G. de L., S.S.)
* manko de perspektivoj kaj de realeco (Z.S.)
* malmodiĝinta, uzanta eksan retorikon (J.S., H.D.)
* nesufiĉaj kontaktoj kun politikuloj (N.K.)
* troa akcentado pri klasbatalo (D.L.)
* SAT-membroj uzas Sennaciulon kiel klaĉan gazeton (V.M.)
* maleblo evolui (C.R.)
* agresema etoso, kiel en sindikatoj (J.J.K.)
* elitismo (P.L.)
* nesufiĉe riĉa enhavo de Sennaciulo

Oni memoru ke ne estas utile scii ĉu tiuj opinioj estas "veraj" aŭ ne (ĉu ili havas realan bazon), sed konscii ke parto de la esperantistaro vidas nin tiel. Ne mankos laboro al la kongresanoj de Karlovy Vary..

Kvina demando : **"Ĉu, laŭ vi, la Statuto de SAT estas daŭre aktuala, aŭ ŝanĝenda kaj kial?"**
Ni tuj rimarku ke 54% de la respondintoj ne konas la Statuton. Pro tio ne svarmas la komentoj. Jen nur tri:
* Statuto ne gravas (C.R.)
* SAT devus UEA-fakiĝi(J.G. de L., M.L.)
Tiu temo aperas konstante en la demandaro. En la homaj socioj oni konstatas du tendencojn kontraŭajn: unuecigo kaj disiĝo. Same en la esperantista socio.
* la ideoj kaj metodoj de SAT datumas de la antaŭa jarcento.

(daŭrigo kaj fino : paĝo 56,57,58)

Opinienketo pri S.A.T

Nombro da partoprenantoj : **86** (62 S.A.T.-anoj + 24 nemembroj de S.A.T.)
el Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Maŭricio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rusio, Svedio, Ukrajno.

1 – Kion vi scias pri S.A.T. ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Multon	35	22	(35,48 %)	13	(54,17 %)
Sufiĉe	23	23	(37,10 %)	0	———
Malmulton	5	5	(8,06 %)	0	———
Iom	12	3	(4,84 %)	9	(37,50 %)
Nenion	0	0	———	0	———
Ne respondas al tiu demando	11	9	(14,52 %)	2	(8,33 %)

2 – Ĉu S.A.T. estas ankoraŭ necesa ?

(Ĉiam pensu ke la mondo ne estas nur Eŭropo kaj Okcidento)

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Jes	66	57	(91,94 %)	9	(37,50 %)
Eble	5	1	(1,61 %)	4	(16,67 %)
Ne	3	1	(1,61 %)	2	(8,33 %)
Ne havas opinion	7	0	———	7	(29,17 %)
Ne respondas al tiu demando	5	3	(4,84 %)	2	(8,33 %)

3 – Kio interesas vin ĉe S.A.T. kaj kial ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Ĉio	6	6	(9,68 %)	0	———
Nenio	2	1	(1,61 %)	1	(4,17 %)
Laborista asocio	14	14	(22,58 %)	0	———
Kultura, filozofia, politika, progresema	38	28	(45,16 %)	10	(41,67 %)
Idealista, sendogma	14	14	(22,58 %)	0	———
Kongresoj, aktivado	21	17	(27,42 %)	4	(16,67 %)
Ne havas opinion	9	0	———	9	(37,50 %)
Ne respondas al tiu demando	5	5	(8,06 %)	0	———

4 – Kio ne plaĉas al vi ĉe S.A.T. ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Ĉio	1	1	(1,61 %)	0	———
Nenio	12	11	(17,74 %)	1	(4,17 %)
Laborista asocio	1	0	———	1	(4,17 %)
Kultura, filozofia, politika	7	3	(4,84 %)	4	(16,67 %)
Ne havas opinion	6	4	(6,45 %)	2	(8,33 %)
Ne respondas al tiu demando aŭ havas opiniojn legeblajn en aparta dokumento	59	43	(69,35 %)	16	66,67 %)

Opinienketo pri S.A.T

5 – Ĉu laŭ vi la Statuto de S.A.T. estas daŭre aktuala ?
Se ne, kio estus ŝanĝenda kaj kial ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
5-a) aktuala ? Jes	27	26	(41,94 %)	1	(4,17 %)
5-a) aktuala ? Eble	0	0	———	0	———
5-a) aktuala ? Ne ĉio	10	10	(16,13 %)	0	———
5-a) aktuala ? Ne	7	6	(9,68 %)	1	(4,17 %)
5-a) aktuala ? Ne havas opinion	13	7	(11,29 %)	6	(25,00 %)
5-a) aktuala ? Ne respondas al tiu demando	29	13	(20,97 %)	16	(66,67 %)
5-b) kio ŝanĝenda ? Ĉio	1	1	(1,61 %)	0	———
5-b) kio ŝanĝenda ? Io	26	26	(41,94 %)	0	———
5-b) kio ŝanĝenda ? Nenio	18	18	(29,03 %)	0	———
5-b) kio ŝanĝenda ? Ne havas opinion	5	5	(8,06 %)	0	———
5-b) kio ŝanĝenda ? Ne respondas al tiu demando aŭ havas proponojn legeblajn en aparta dokumento	12	12	(19,35 %)	0	———

6 – Kion vi ŝatus ke S.A.T. proponu al la esperantistaro kaj al progresemaj medioj ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Havas proponojn legeblajn en aparta dokumento	69	52	(83,87 %)	17	(70,83 %)
Ne havas opinion	8	1	(1,61 %)	7	(29,17 %)
Ne respondas al tiu demando	9	9	(14,52 %)	0	———

7 – Viaj proponoj

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Havas proponojn legeblajn en aparta dokumento	67	49	(79,03 %)	18	(75,00 %)
Ne havas opinion	7	1	(1,61 %)	6	(25,00 %)
Ne respondas al tiu demando	12	12	(19,35 %)	0	———

8 – Kiel varbi novajn membrojn kaj precipe la gejunulojn ?

	Respondoj	S.A.T.-anoj		nemembroj de S.A.T	
Havas proponojn legeblajn en aparta dokumento	58	39	(62,90 %)	19	(79,17 %)
Ne havas opinion	9	4	(6,45 %)	5	(20,83 %)
Ne respondas al tiu demando	19	19	(30,65 %)	0	———

Sesa demando: **“Kion vi ŝatus ke SAT proponu al la esperantistaro kaj al progresemaj medioj?”**
Nun venas la tri demandoj kies respondoj estas plej riĉaj kaj plej multnombraj. Iuj respondoj aspektos naivaj al SAT-anoj kiuj de multaj jaroj aktivas, sed ni decidis aperigi ĉiujn opiniojn. Ni povas bedaŭri ke plejparte tiuj sugestoj havas tre ĝeneralajn karakterojn, sen praktika aplikeblo. Sed SAT ricevos kun plezuro praktikajn sugestojn, kaj kunlaborojn. Jen la listo de la proponoj:
* Krei ĉie SAT-grupojn (A.G. de A.)
* Instigi forumon por debati la principojn de mondorganizo (J.S.)
* Difini novan celaron (D-S.C.)
* Praktiki solidarecon kaj informadon pri la interŝanĝa distribuado (S.I.L., H.D.)
* Engaĝiĝi sur alternativa tereno (A.F., P.L.)
* Intensigi la rilatojn kun politikaj partioj kaj sindikatoj, eventuale helpe de profesiuloj pri komunikado (A.F., J.G. de L., L.D.)
* Inviti la progresemajn mediojn uzi Esperanton (J.G. de L.)
* Agi kunlabore kun U.E.A. kaj E.R.A. cele la registarojn, oficialulojn ktp (M.L.)
* Alpreni poziciojn rilate la leĝojn kiuj estis alprenitaj en diversaj landoj kontraŭ la elmigrintoj (D.)
* Agadi favore al la senlaboruloj, la senlegitimuloj, la popoloj en lukto (F.M.)
* Forigi la kontraŭ-spiritualisman materialismon (B.M.)
* Proponi ideojn por la nova tempo (C.R.)
* Peri kiel peranto por internaciaj interŝanĝoj inter laboristaj, maldekstraj kaj progresemaj organizaĵoj.
* Provoki fortan kunlaboron inter SAT kaj U.E.A. (D., B.M.)
* Montri simpation al la verduloj sed ne al la socialistoj (A.V.)
* Aperigi artikolojn en la sindikatistaj gazetoj (A.F.)
* Krei ligon kun la Monda Fonduso pri Solidareco (P.L.)

Oni povas rimarki ke tiuj proponoj celas duon-duone la peresperantan kaj poresperantan agadojn.

Sepa demando: **“Viaj proponoj”**
Ne estis demando, sed peto. Denove listo :
* Uzi sisteme Internet (J.S., H.D., A.F.)
* Proponi ke Esperanto fariĝu kleriga lingvo por la landoj kies lingvo(j) ne estas sufiĉe “riĉaj” (ekz. Madagaskaro) (D-S.C.)
* Partopreni en debatoj pri ekskludoj pro la neoliberala merkatekonomio (H.D.)
* Konvinki la maldekstrajn partiojn ke Esperanto ne estas burĝa strangaĵo sed demokrata kontraŭstaro al usona superregado (L.D.)
* Organizi debatojn inter SAT-anoj kaj ne-SAT-anoj (F.M.)
* la SAT-anoj disflorigu (!) siajn “talentojn” en la ĝenerala Esperanto-movado (B.M.)

Oka demando : **“Kiel varbi novajn membrojn kaj precipe la gejunulojn ?”**
Kompreneble, oni iom retrovas la samajn respondojn al tiu demando, samaj kiel tiuj de la 6-a kaj 7-a demandoj. Sed, pro respekto al la respondintoj, ni ĉiujn listigas:
* Instigi publikajn diskutojn en ĉiuj medioj, festojn, debatojn (A.G. de A., J-S., D-S.C., M.L.), per interreto (A.G. de A., B.M.);
* Kunlabori kun Monda Fonduso pri malsato (P.L.);
* Montri utilecon de Esperanto (D.L.);
* Aliri rekte homhelpajn asociojn, sindikatojn, partiojn (F.M., B.M.);
* Proponi novajn ideojn kaj projektojn (A.F.);

kaj pli precize pri la gejunuloj:
* Plivigligi la SAT-Junulfakon (P.L.);
* Doni al la junuloj lokojn en la Komitato(j) (P.L.)

kaj pri la stilo de la Asocio :
* la klarigoj devas esti koncizaj (A.B.);
* Oni devas forlasi la malnovan retorikon, la malmodernecon, la enuigajn tekstojn (H.D.);
* Agi anstataŭ paroli (M.L.);

kaj kiel kvazaŭ neatendita konkludo :
* la plej efika laboro estas la loka aktivado (B.M.)

El tiu ĉi materialo, la SAT-anaro povos tiri kelkajn konkludojn kaj proponi agadplanojn. Jen kelkaj provizoraj rimarkoj:
* kvankam la peresperanta karaktero de SAT estas konata, la proponoj koncernas precipe la poresperantajn celojn;
* pri la politika, denaska engaĝiĝo de SAT, la opinioj tre diversas. Oni povas resumi ilin en du frazoj: - SAT estas tro radikala ;
- SAT estas nesufiĉe radikala...
Pripensinda....

La duan parton vi trovos en la venonta numero de Sennaciulo. Bonvolu konservi ilin ĉar ili servos kiel bazo, por la diskuto dum la SAT-kongreso en Karlovy Vary.

KVINA LISTO DE ALIĜINTOJ AL K.VARY

93.Ramelli Modesto (FR); 94.Kumpošt Bohuslav (CZ); 95.Ternant Sylvie(FR); 96. Collomb Anita (FR); 97.Humpova Jaroslava (CZ); 98. Jonasson Jirina(SE); 99. Jonasson Vilmer (SE); 100. Lépeix Jacqueline (FR); 101. Baert Eric (BE); 102. Bieloviene Nijole-Terese (LT); 103. Hoeijenbos Kess (NL); 104. v.d.Hoek Luc (NL); 105. Delagneau Madeleine (FR); 106. Delagneau ??? (FR); 107. Jennings Vincent (US); 108. Jankowski Johannes (DE); 109. Schicke Harald (DE); 110. Gxong-Ok (DE); 111. Toubale Yacine (AU); 112. Jahger Elisabeth (US); 113. Jahger Frans (US); 114. Vivancos Eduardo (CA); 115. Klementova Alena (CZ); 116. Stoilova Zlatka (BG); 117. Adeline Philippe (FR); 118. Ganche Gabrielle (FR); 119. Adeline Louise (FR); 120. Adeline Clément (FR); 121. Bloudek Miloš (CZ); 122. Noulin Marc (FR); 123. Noulin Danielle (FR); 124. Karešova Lucie (CZ); 125. Krupka Jaroslav (CZ); 126. Pluhar Zdenek (CZ); 127. Kwantes Rob (NL); 128. Kwantes-Kooij Corrie (NL); 129. Kwantes Nico (NL);

«CAO», sociala organizaĵo por senhejmuloj

Post mia aliĝo al Asocio de Sociallaborantoj Esperantistaj (ASLE), dum la kongreso de Montpellier, Soile Lingman proponis, ke mi skribu artikolon pri mia laboro en la informilo de tiu asocio. Mi finfine elektis redakti dosiereton por ke la informo estu iom pli kompleta, kaj jam sendis ĝin al kelkdekaj kolegoj kaj interesatoj en dudeko da landoj.
Post baza priskribo de CAO, de la rolo de tiu organizaĵo, de la helpatoj, de la helpiloj, ktp, mi aldonis skemon por komprenigi la econ, rolon, buĝeton, kaj interplektiĝon de la socialaj strukturoj, loke intervenantaj por batali kontraŭ senhejmeco kaj ekskludeco.
Por mi, tiu skema klarigo estas la mejla ŝtono de tiu prezento, ĉar ĝi provas reliefigi la socialan sistemon en Francio, kiu baziĝas sur laikaj kaj respublikaj konceptoj, kun granda rolo de la ŝtato kaj aliaj publikaj instancoj. En aliaj landoj, sistemoj tre certe tute malsimilas. Mi ŝatus kompreni kiel konstruiĝas la sociala skemo en aliaj landoj, tra la vido kiun la tieaj sociallaboristoj havas de ĝi per siaj propraj laborspertoj.
Kolegoj kaj interesatoj, kontaktu min :

Nicolas Yves, 17 37 quartier du Bois, 14200 Hérouville, Francio.
<yvanmi@club-internet.fr>
adreso de ASLE : Soile Lingman, Västerasgatan 4, SE-113 '« Stockholm. Svedio.»

VERDAJ MALPERMESOJ DE AŬSTRALIO REVENAS EN LA LUMĴETILO

el "La verda Proleto, marto 1999

Jack Mundey, 66-jara estro de la Nova Sudkimrio, filio de la Federacio de Konstrulaboristoj (BLF) ne aspektas kiel arda protektanto de la natura medio, sed li savis "The Rocks" ("la rokoj") Sidnejo, unu el la plej historiaj lokoj de la lando, la unua porblankuloj-kolonieto de Sidnejo.
En la 1970-aj jaroj, BLF enkondukis la "Verdaj malpermesoj"-movadon, per kiu laboristoj rajtis rifuzi labori ĉe projektoj kiuj difektus la naturan medion. La movado tratranĉis sociajn kaj politikajn limojn kaj malebligis multajn altkostajn projektojn je tempo kiam la konstruestraro evidente volis imiti la horizonton de Manhatano. Mundey diris, "Jen sindikato kun konscienco". En sia libro "Verdaj Malpermesoj, Ruĝaj Sindikatoj", ŝtatpolitikisto Meredith Burgmann kaj politika sciencistoVerity Burgmann atribuas la allogon de BLF al kolektiva socia konscienco interne de la sindikato, kun ĉefe komunista gvidantaro: "Konstrulaboristoj estas tre lertaj, kun principaj, karismaj homoj kiuj pridemandas aferojn."
La BLF-a membraro duobliĝis inter 1969 kaj 1973 kaj malebligis 43 projektojn, nuntempe de valoro US$13 bilionoj. Laŭ Mundey, la nomŝanĝo de Nigraj Malpermesoj al Verdaj Malpermesoj (VM), multe pligrandigis publikan subtenon. La unua VM okazis je 1971 ĉe Kelly's Bush en la Sidneja suburbo Hunters Hill, kie grupo da dommastrinoj petis la helpon de VM por malebligi la konstruon de 25 luksaj domoj, kaj savi tie la originalajn skulptaĵojn de la indiĝenoj. La dommastrinoj sciis pri la eldonita deklaro de BLF rilate al socia prirespondeco de la laboristaro, kaj ili petis helpon de la aktiva sindikato. VM metiĝis ĉe Kelly's Bush, kaj post du monatoj la batalo gajniĝis.
"The Rocks", kiu etendiĝas de la norda limo de la Sidneja komerca kvartalo ĝis la bordo de la haveno, allogas pli ol 7.000.000 da turistoj jare. Luksegaj mansakoj troviĝas en butikfenestro ne for de la "Fortunes of War" (Militsorto), Hotelo, kiu malfermiĝis en 1839 kaj posedas la plej longan, kontinuan poralkoholaĵan permesilon de Sidnejo. Laŭ la strato troviĝas "Cadman's Cottages" (dometoj), kelkaj el la plej malnovaj konstruaĵoj de Aŭstralio, konstruitaj en 1816 por la ŝipanaroj de Gubernatoro Phillips. La kvartalo enhavas belajn malnovajn domvicojn, sabloŝtonajn butikojn kaj trinkejojn. Tamen, en la 1970-aj jaroj, la konstruestroj antaŭvidis grandan profiton, kaj de tiam komenciĝis la 4-jara batalo pri "The Rocks". La enloĝantoj rifuzis eliri kiam la konstruestroj penis eniri. Ĉi tiu estis la unua BLF-a batalo por savi estontajn konstruaĵojn de la detruglobo, kaj pensado kontraŭ malkonstruo estis malofte paca. Post unu disputo 58 homoj inkluzive de Mundey arestiĝis. Unufoje, 4000 konstruistoj forlasis konstruejojn en Sidnejo subtene de la VM ĉe "The Rocks".
«Mi supozas, ke "The Rocks'VM estas aparte plej ŝatata ĉar tio estas ankoraŭ laborista klaso, sed laŭ la konstruestroj, " publika malamiko numero unu". Laŭ Mundey unu el ili penis lin korupti per A$ 20 milionoj por eviti malpermeson.
Pro BLF-a politiko, Mundey perdis direktadon de filio de Nova Sudkimrio-meze de 1970-aj jaroj kaj poste perdis sian sindikatkarton dum jardeko. Tial li ne povis labori ĉe iu ajn konstruejo dum la 1980-aj jaroj, sed en 1996 oni restarigis lin kaj fiksis plakon ĉe "The Rocks"" por rememorigi lin kaj lian VM-movadon.
"Dum 25-jaroj" diris Mundey, "oni kalumniis nin; nuntempe oni glorigas nin." Lia batalo por savi la naturan medion neniam ŝanceliĝis. Li estras la Fidei-komisionon por Historiaj Domoj de Nova Sudkimrio kaj la komitaton por Savi la Orientan Cirklan Kajon, al kiu estas celata grandega havenfronta loĝbloko ŝercnomita "la panrostilo", konstruota apud la Sidneja Operejo.
"Ĉiam ekzistos konflikto inter konservado kaj konstruado" diris Mundey. "Nia plej grava agado estis politikigi medi-konservajn aferojn. Tiaj aferoj tiel restos estonte".

Victoria Tait (Sidnejo), "The Times of Malta" ĵurnalo, 1998.11.25

El La Verda Proleto, marto 1999.

Sindikata alvoko por manifestacii la 29-an de majo 1999 en Kolonjo (Germanio)

De pluraj jaroj asocioj kontraŭ la maldungo, radikalaj sindikatoj (C.G.T. en Hispanio, U.S.I. en Italio, SUD kaj C.N.T. en Francio) organizas marŝojn kontraŭ la maldungo kaj la mizero direkten al la urboj kie okazas eŭropaj registaraj renkontiĝoj. Lastjare tio okazis en Amsterdamo, kaj ĉi-jare en Kolonjo.
Tiu manifestacio celas:
- malpermesi la maldungojn;
- redukti la laborhoraron;
- garantii decan salajron, laborrajtojn kaj sindikatajn liberecojn.

La SAT-PK sugestas al la SAT-membroj ke, ĉu individue, ĉu kolektive, ili solidariĝu kun tiu manifestacio.

Ni ĵus ricevis la suban tekston de nia membrino el Beogrado, kiun ni volonte aperigas:

***

«La pontojn oni povas detrui, sed esperantaj pontoj estu eternaj.»

NESENDITA LETERO AL NENASKITA NEPO !

Mia venonta suno !
Nun mi ne scias ĉu ni sukcesos ĝisatendi vin, ĉar via patrino diras al mi, ke ŝi ankoraŭ ne estas kapabla akcepti vin kaj zorgi pri vi. Vi devas atendi aŭ atendadi. Eble estos pli bone por vi, ĉar vi ekvidos la mondon post solvitaj problemoj en Kosovo.
Pri Kosovo turka kaj Kosovo albana vi certe legos. Ni deziras al vi ke vi vivu en la mondo sen landlimoj, kun homoj kiuj parolos internacian lingvon Esperanto - krom sia gepatra lingvo. Tiam estus nek malkomprenoj nek militoj. Se mi ne plu estos ĉi tie - miaj esperantaj libroj atendos vin. Se ni tamen sukcesos ĝisatendi vin, la unuajn vortojn kiujn vi aŭdos de mi estos : «Mia suno»!
Via esperanta avino :

Letica Saviĉ,
Beogrado, Jugoslavio.

VIAJ REAGOJ ...

Reago al la letero de Jaqueline Lépeix aperinta en Sennaciulo 1125 de marto 1999.

Kies homaj rajtoj

En la marta numero de Sennaciulo aperis sub «Viaj Reagoj» longa letero de k-dino Jaqueline Lépaix. Ŝi, en la letero, pritraktas la problemon de la «Eŭropa ĉarto pri la laikeco». Kiel ĉiam, la letero estas interesa, iumomente ŝi petas eĉ la opinion de la «Liberecana frakcio de SAT», ĉu provoke aŭ honeste? Kiu scias? Kompreneble mi ne estas «la» Liberecana Frakcio de SAT. Mi nuntempe redaktas nur la «Liberecana Ligilo»n, do nur sablero en la tuto. Mi tamen decidis reagi je propra nomo. Mia reago nepre ne estas la opinio de aliaj liberecanoj. Pri tio ne povas ekzisti iu ajn dubo.

Jacqueline skermas per esprimoj kiel Eŭropa kortumo, Eŭropa konsilantaro, deklaracioj, Eŭropa konvencio, ktp, ktp, kaj pri tiuj aferoj, fremdaj al serioza liberecana strukturo ŝi petas nian opinion.

——»La eŭropa kortumo de la homaj rajtoj senĉese defendas individuojn kaj minoritatojn kontraŭ la misuzoj de la ŝtatoj. Kiel ĝi povus akcepti tekston, kiu principe neas la rajtojn de la individuo? Tiu kvina artikolo liveras la civitanon, kun piedoj kaj pugnoj ligitaj, al la bontrovo de «lia» ŝtatestro.—

La Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj Eŭropa konvencio de Homaj Rajtoj, devus protekti la civitanojn kontraŭ la bontrovoj de la ŝtatoj. Problemo nur estas ke reprezentantoj de tiuj samaj ŝtatoj estis la iniciatintoj de tuj deklaracioj. Dum prelego farita en Nederlando mi komparis la Universalan deklaracion pri homaj rajtoj kun la reguloj pri Homaranismo de dro Zamenhof. Mia konkludo estis ke la regularo de Zamenhof havas, por mi, la saman valoron kiel la grandega deklaracio pri homaj rajtoj. Eĉ pli, la reguloj de Zamenhof almenaŭ venis el la koro de honesta persono kaj la deklaracio jam ekde la komenco estas ŝtataj trukoj por narkotigi homamason. Ne, mi ne diras ke la deklaracio ne havas valoron, sed la nura problemo estas ke vi kaj mi ne bezonas tiun deklaracion, kaj la personoj kiuj jes bezonas ĝin, viŝas la postaĵon per ĝi. La grandaj demagogoj, la Clintonoj, Sadamoj, Miloŝeviĉoj, Jelcinoj kaj samaj demagogoj laŭte parolas pri homaj rajtoj, sed samtempe defendas la «rajtojn» de la multnaciaj entreprenoj kaj grandkapitalo. Tiuj samaj politikistoj estas la bildo de la nuna ŝtato. Ili decidas pri vivo aŭ morto, dum militaj cirkonstancoj aŭ sur la nova versio de la gilotino. Mi pensas ke, kiam mi diras, ke la nura solvo por la mondaj problemoj estas malaperigo de la ŝtatoj kaj ĉiuj, kiu apogas tiun strukturon, mi esprimas la ideojn de la plejmultaj anarĥiistoj. En la tuta ŝtata strukturo mankas ĉiu ajn formo de honesteco, mankas baza demokratio, mankas respekto al la individuo, por la socio, la komunumo. Vi mia kara k-dino multege tradukis el liberecanaj tekstoj por ke vi ne sciu pri kio temas. Do fakte mi pensas ke via peto en la letero estas provoko al la direkto de la liberecana frakcio de SAT. Frakcio kiun vi jam sufiĉe kondamnis en la liberesprima gazeto de nia kompano Kribo, "Laŭte".

Jam la fakto ke homoj vivas en strukturo kie ili (la tiel nomataj gvidantoj) devas meti sur papero kiamaniere vivi, diras sufiĉe pri tiu strukturo. Vi mem tradukis «Interhelpo»n de Kropotkin. Mi pensas ke tiu verko estas la «regularo» kaj mi ege singarde uzas la esprimon, por la liberecanoj. Ni ne bezonas la pamfletojn kaj falsajn deklaraciojn de la ŝtatestroj. La nura avantaĝo de la diversaj deklaracioj estas ke ni povas indiki kiom da fojoj la ŝtatoj tretas la regulojn, la normojn, kiujn ili mem kreis por silentigi la homojn. Kiel liberecano evidentas ke mi defendas la homajn rajtojn, sed mi ne bezonas la oficialajn ŝtaregulojn por respekti miajn sammondanojn. En la homaj rajtoj de la liberecanoj ne estas loko por subpremi homojn aŭ oficiale murdi ilin. Pri laikeco mi jam tro longe debatis kun vi en «Laŭte», mi ne volas refari la saman debaton en Sennaciulo.

Relegu mi petas la frazojn de E. De Kock,
Ĉu entute ekzistas bezono por ia ajn registaro, aŭtoritato aŭ leĝo?
Ĉu nesufiĉus bonaj intencoj?
Ĉu la individuo povas sperti feliĉon, se la socio limigas per reguloj?

Jakvo

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris

Tel: +33.1.47.97.87.05, Fax: +33.1.47.97.71.90

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke en la jaro 2000 ni povos eldoni ĝin.-Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

FONDUSO NOVA PIV

KFP sekcio Haarlem 500 NLG; André Weiss 1000,00 FRF; Fukumoto H. 3600,00 JPY; Hirayama T. 2400,00 JPY; Aihara E. 400,00 JPY; anonime 3600,00 JPY; Yamasaki S. 5000,00 JPY; Hayasi K. 10000,00 JPY; Tani H. 2000,00 JPY;

HELPO AL LA ASOCIO

En Nederlando (NLG) Landwehr 10,00;
En Belgio (BEF) S. De Weerd 5000,00; anonime 2000,00; De Sousa 800,00; C. Staquet 1300,00;
En Francio (FRF) M. Guillou 55,00; R. Hardy 95,00; anonime 305,00; ge-Dehan 50,00;
En Japanio (JPY) Oogusi S. 1600,00; Nakamura H. 2300,00; Itimura S. 11600,00; Maoda Y. 800,00; Yamasaki S. 1200,00; Hayasi K. 1600,00; Isikawa T. 1200,00; Tanaka K. 1800,00;

HELPO AL SATESPER@CYBERCABLE.FR

Anonime 610,00 FRF;

NOVALIĜOJ

35.409 LINGLART Serge, 14 rue Ambroise Paré, FR-37400 Amboise, Francio
35.410 *LAMBERT Marinette, 32 rue des Couronneries (Appt.10), FR-86000 Poitiers, Francio
35.411 MORIO André, 631 rue de Carentan, FR-50000 Saint Lô, Francio

Nia kamarado inter ni



Dum sia vojaĝo al Parizo, nia k-do Kep. Enderby, aktuala prezidanto de UEA vizitis ankaŭ la SAT-sidejon, kiel li partoprenis al la kunveno de la Plenum-Komitato.

KOSOVO-SERBIO-MONTENEGRO-MAKEDONIO

La tuta mondo nuntempe tre interesiĝas pri la eventoj kiuj okazas en tiuj kvar teritorioj.

Plejparte la registaroj, la politikaj partioj, la gazetaro atentas pri la naciistaj, etnaj, religiaj, militistaj aspektoj de tiu konflikto.

Ni, membroj de la Plenum-Komitato de SAT, volas reliefigi la fakton ke en tiuj partoj de la mondo vivas simplaj homoj kaj laboristoj. Inter ili estas membroj de nia Asocio.

Tiuj laboristoj, ĉu albanaj, ĉu serbaj, ĉu montenegraj, ĉu makedoniaj, ktp., suferas nun de la konsekvencoj de tiu milito, kaj plejparte ili ne respondecas pri la komenciĝo de tiu konflikto.

Kiel konsciaj laboristoj kaj SAT-anoj, ni estas tre emociitaj pro al ili truditaj suferoj, kaj ni estas solidaraj kun la laborista klaso de tiuj teritorioj.

Niaj pensoj estas destinitaj al niaj membroj kaj ni alvokas ilin por ke ili indiku al ni ĉion, kio necesas por helpi ilin. Ni diskonigos tiujn petojn pere de Sennaciulo al nia tuta membraro kaj ni provos helpi ilin laŭ niaj povoj.

Ekster tiu natura kaj solidareca agado, ni tre konscias ke la opinioj de nia membraro estas tre diversaj pri tiu terura milito. Pro tio Sennaciulo estas je la dispono de tiuj, kiuj deziras debati pri ĝi. Ni, SAT-PK-anoj nur atentigas la kontribuantojn al tiuj debatoj, ke ili konservu la serenecon.

La PK de SAT



72-a kongreso de S.A.T.
Karlovy Vary 1999-07-24/31

Kontaktadreso por sendi aliĝilojn :
KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice
Tel.: +420.2.99112201, Fakso: +420.2.9912126, rete : chrdle@kava-pech.cz
HejmpaĝoTTT:http:/www.kava-pech.cz/.

Aliĝoj kaj pagmanieroj :
La kotizojn kaj pliajn pagojn, laŭ la elektitaj kaj menditaj servoj bonvolu pagi per unu el jenaj manieroj, kiujn bonvolu ne forgesi indiki en la aliĝilo:
* al la konto 555444-051/0100 (KAVA-PECH) ĉe Komerĉni banka Praha-Smichov.
* poŝtkonto de SAT: n° 1234-22 K, Paris.
ambaŭkaze kun klara indiko **«72-a kongreso»**.

Kotiztabelo (ĉiuj prezoj en Francaj Frankoj (FRF) aŭ Eŭroj (€)

Kategorio	99/05/31	poste
SAT-membro	430 FRF / 66 €	500 FRF / 76 €
SAT-geedzoj	690 FRF / 106 €	800 FRF / 123 €
SAT-gejunuloj	215 FRF / 33 €	250 FRF / 38 €
nemembroj de SAT	530 FRF / 81 €	600 FRF / 92 €
geedzoj, SAT-nemembroj	840 FRF / 128 €	950 FRF / 144 €
gejunuloj, SAT-nemembroj	285 FRF / 44 €	330 FRF / 51 €

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 30% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 50% rabaton.

Asekuro dum la SAT-kongreso kaj antaŭkongreso

Ni volas atentigi ĉiujn SAT-kongresanojn, ke la prezoj de kuracado en Ĉehĥio estas ekstreme multekostaj, tial nepre vi venu asekuritaj aŭ vi povas asekuri vin pere de OKK (skribu al Petro Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice, fakso 00420.2.9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz) ĉe Ĉeĥa ĝenerala asekurigejo. Jen la kondiĉoj de asekuro de eksterlandanoj por mallongdaŭra restado en Ĉeĥio inkluzive transitajn landojn krom sia propra.
La prezoj estas en ĉeĥaj kronoj, sed ni jam trakalkulis ilin al eŭroj (ĉar la baza unuo estas 35 kronoj, do ĝuste € 1):
La tarifoj estas por unu persono kaj unu tago, por minimume 3 tagoj, maksimume 60 tagoj:

Personoj 0 - 69 jaraĝaj: € 1.-, ĝis 79 jaroj € 2.-, ĝis 99 jaroj € 3.-, pli aĝajn personojn ne eblas asekuri.
La plenumo kaze de bezono estas ĝis (trakalkulo el ĉeĥaj kronoj): neprokrastebla kuracado post la asekurevento ĝis € 28000.- / akuta helpo ĉe la dentisto € 138.- / Repatriiĝo ĝis € 8400.- / plenume de unu asekuro entute maksimume € 56000.-.
Aliĝintoj, kiuj indikis la intereson en la aliĝilo ricevos pli proksimajn informojn perpoŝte ne pli malfrue ol 3 semajnoj antaŭ la veno. Por fari la asekuron ni devas koni precizan (laŭpasportan) kompletan nomon, naskiĝdaton, daŭran restadadreson, pasportnumeron, ekveturon (la unuan tagon de la asekuro) kaj forlason de la lasta transita lando (la lastan tagon de la asekuro).
Tiuj, kiuj jam pagis siajn kotizojn kaj ĉiujn ceterajn menditajn servojn povas pagi la asekuron surloke ĉe la akceptejo, kiu ankoraŭ pagos iujn servojn bv. aldoni ankaŭ la menditajn asekurtagojn laŭ viaj aĝo kaj daŭro de la celata asekuro.



Liberecana Frakcio de SAT

Por ricevi la bultenon "Liberecana Ligilo" de tiu ĉi SAT-Frakcio, vi sendu la abonprezon (50 FRF, 300 BEF, 16,50 NLG, 7,50 €, ktp) al la ĉi-subaj perantoj:
- Robert Prevost, FR-41800 Troo, Francio (pĉk 3852-15 C, La Source)
- Nicolas Gil Carballo, 1062 Postakutxa, ES-20080 Donostia, Gipuzkoa, Hispanio
- Pelle Persson, Svartviksvagen 14, SE-12352 Farsta, Svedio, (p ĉk 6841613)
- Tani Hiroyuki, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si, Japanio (pĉk 00980-9-37624, SAT-Nihon)
- aŭ al la SAT-sidejo (pĉk SAT, n° 1234-22 K, Paris kun indiko, por "Lib.Ligilo").

kaj sendu eventualajn artikolojn al :
Progresema Esperanto-Forumo
Hof ter Bekestraat 49, BE-2018 Antwerpen, Belgio (retadreso: jakvo@agoranet.be).

"LIBERECANAJ PENSOJ" (2 volumoj - 480 paĝoj). Eld. SAT-Broŝurservo - Laŭte!, FR-47470 Beauville. Akirebla kontraŭ 120 FRF (18 €) aŭ 100 FRF (15 €) por almenaŭ 3-ekzemplera mendo. Poŝtkonto: 3371 74 M, Bordeaux.

De multaj jaroj nia k-do KRIBO (Christian Baudé) eldonas multege da diversaj broŝuroj. Interalie, sufiĉe multnombrajn pri la liberecana movado. Antaŭ kelkaj monatoj li havis la ideon ilin kompili sub formo de du volumoj, kaj tiel naskiĝis la libro "Liberecanaj pensoj" - kiu entenas la jenajn tekstojn:
1. La liberecana penso (1)
2. Liberecanaj vivkonceptoj pri socio-organizado (Fontaura)
3. Imaga dialogo Marks/Bakunin (M. Cranston)
4. Revolucia registaro kaj aliaj tekstoj (Kropotkin)
5. La piramido de l'tiranismo (F. Domela-Nieuwenhuis)
6. Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj (Eriko Malatesta)
7. Durruti, simbolo de la Hispana revolucio (Pario)
8. La liberecana penso (2)
9. Memvola servuto (La Boétie)
10. La homa animo sub socialismo (Oscar Wilde)
11. Internacia laborista asocio
12. La parlamentisma iluzio (C.A. Laisant)
13. En anarkiista socio, kiel kondutos la individuo (Jean Grave)
14. Francisko Ferrer
15. La anarkiistoj (Sébastien Faure)
16. Pripensoj pri anarkiismo (Maurice Fayolle)
17. Esperanto kaj la anarkiistoj (E. Vivancos)

Neniu plu "rajtas" ne scii pri la esenco de la anarkiistaj pensmanieroj! Kiel kutime, tiu eldono de la SAT-B.S. estas perfekta, kaj plie ĉi-foje ĝi enhavas belan kovrilon. Sed en iu recenzo devas esti minimume unu kritiko: mi nur notu ke en la enkonduko estas aludo pri la ribelo en Kronŝtado, dum la rusa revolucio. Ĝi ne okazis en 1918, sed en 1921.
Alia rimarko, pri la ĝenerala enhavo mem. Oni povas noti ke la aŭtoroj estas tre nombraj. Sed mankas kelkaj. Pri tio la SAT-Broŝurservo ne "kulpas", sed ĉiuj esperantistoj liberecanaj kiuj kapablas verki aŭ traduki. Interalie mi kredas ke neniam iu teksto de P.J. Proudhon estis esperantigita (sed mi povas erari). Traduki la tutan verkaron de P.J.Proudhon estas verŝajne freneza projekto, sed mi konsilus al kuraĝul(in)o la tradukon de "Textes et débats" (Tekstoj kaj debatoj), bnonega kompilado de Pierre Ansart, universitata profesoro (eld. Le livre de poche, 1984).
Sed, ekde nun, tuj akiru "Liberecanaj Pensoj-n". Estos por vi bona investo.

Ivo Peyraut

Memore al nia ĵus forpasinta kamarado MARKO PETROVIĈ (1940-1999)

En sia lasta letero sendita al nia redakcio de antaŭ iom pli ol tri jaroj nia kamarado, tiam loĝanta en sia domo en Surĉin (suburbo de Beogrado) skribis la jenon:

«Dankon por la gazetoj. Poste mi skribos kien vi plu sendu al mi la gazeton. Mi estas senadresulo per du pogromoj, la maja kaj la aŭgusta kaj estas forpelita el mia hejmo. Samo okazas en ĉi-media Esperanto-movado, kie la matrikuloj (li citas kvar matrikulojn de SAT-anoj kiujn ni ne reproduktas, nldr) forpelas kaj persekutas la sennaciulojn, eĉ per pugnoj! Tio estas temo por la firomano «7000 tagoj en Serbio». Leginte la rubrikon «El la redaktejo», mi sendas al vi miajn tradukojn el la serba satirpoezio kun petego ke vi publikigu la poemojn de Ljubomir Nenadoviĉ «Rano» kaj «Kolegaro», okaze de la 100-jara datreveno de lia morto. Sama peto en mia medio estas tuj bojkotita ĉar tio estas «io de mi». Tio estas la daŭra spiritvaloro, kontraste al la aktuala nazikrabreja furoro. Kore salutas vin ĉiujn, Marko.»

Memore al li, ni aperigas tiujn poemojn:

Ljubomir Nenadoviĉ (1826-1895)


RANO

Flugleviĝis aglo, kiel ĝi kutimas,
al montaralteco, kien hom' ne grimpas,
lasinte malsupran ajnulpanoramon,
ĝi sur montarpinto ekvidis la ranon,
la aglo ekmiris, demande mienis :
- Sur tioman alton, kiel vi alvenis ?
Rano - vekiĝinte - respondis oscede :
- Mi sen la flugiloj - alvenis perpiede!

KOLEGARO

- Kia estas por vi kolegaro nia ?
sekvis la demando al saĝulo pia.
La saĝul' prefere sian ridon regus :
- Se ili libriĝus, ilin mi ne legus !

Kamarado Marko devis forlasi sian domon en Surĉin kaj serĉi alian en la najbara lando, kie li ĵus mortis.



Ni legis por vi...

Joseph d'Arbaud: **La besto de Vakareso**. El la okcitana tradukis Johano Luko Tortel. 1999 Kava-Pech. 96 paĝoj. 40 FRF ĉe SAT aŭ SAT-Amikaro. Kun postparolo de la tradukinto.

La okcitana lingvo estas unu el la etnaj lingvoj de Francio. Antaŭ trideko da jaroj oni povis aŭdi ĝin tre ofte en sudfranca kamparo. Ĝi estas tre malnova lingvo kun literatura tradicio.

En la dek-naŭa jarcento ĝi konis literaturan renaskiĝon precipe en Provenco (regiono de Marsejlo) plej konata estas la nobelpremiita poeto Frederic Mistral. Li uzis la provencan dialekton tial ke la lingvo estas ofte konata sub la nomo provenca lingvo.

Joseph d'Arbaud (1874-1950) estas la plej konata reprezentanto de la literatura skolo "Felibriĝo" , kiu kontribuis al la renaskiĝo de la okcitana lingvo. Post jura studado li retiriĝis en bienon en Kamargo (Rodana Delto) por fariĝi taŭr- kaj ĉevalbredisto. Li dediĉis sin ankaŭ al la konservado de la provencaj lingvo kaj tradicioj.

La besto de Vakareso (1926) estas lia plej fama novelo.

La aŭtoro komence uzas oftan literaturan procezon: li heredis taglibron de la rajdogardisto Jakobo Rubaŭ alinomita Raspavangí, kiu vivis en la dekkvina jarcento en Kamargo, kies ĉefa marĉejo nomiĝas Vakareso. En tiu jarcento de inkvizicio, estas danĝere esprimi neortodoksan opinion. La agado okazas en la plej sovaĝaj lokoj de Kamargo. La intrigo estas simpla kaj kreas dekomence misterplenan etoson: La rajdgardisto malkovras spurojn, ŝajne de apro, sed poste evidentiĝas, ke ili malsimilas ĉiajn tieajn spurojn. Pro scivolo li sekvas ilin. Longe li rajdas tra tiuj malfekundaj, vastaj, salaj, herbejaj marĉoj, kie danĝeras akvaj truoj, kie realeco kaj imagado intermiksiĝas, kaj apenaŭ estas disigeblaj. Li trafas strangan timigan estaĵon, duone homan duone kapran, parolkapablan, kies lacegeco vekas lian kompaton. Li longe hezitas inter timo kaj kompato al la "besto", fuĝas antaŭ ĝi, aŭdas ĝiajn plendojn, simpatias kun ĝi, lasante al ĝi nutraĵojn. Fine li serĉas la beston dum tagoj, sed malkovras nur ĝiajn spurojn ĉerande de ŝlima marĉo, kie ili malaperas. Ĉu la besto tie enŝlimiĝis? Ĉu ĝi fuĝis aliloken? Li ĝin neniam plu revidos.

Tiu besto memorigas al ni la antikvajn duondiojn, proksimajn al la naturo, kiujn la moderna tempo forpelis. Tio estas la mesaĝo de la aŭtoro. Moderna vivo forpelas provencajn vivmanierojn kaj tradiciojn, kiujn simbolas la besto kun certa aludo pri paganismo. Sed pli ol tiu mesaĝo ravis min tiu pejzaĝo, en kiu naturo kaj sentoj miksiĝas, samkiel realo kaj imagado. Jen verko leginda en elstara traduko, multe pli kvalita ol la franca traduko. Jen fascina vojaĝrakonto, senfina rajdado tra sovaĝa provenca pejzaĝo, nun malaperanta sub turistaj hordoj.

Robert PONTNAU

S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

EL LA ESPERANTO-MOVADO por junaj SAT-anoj

O	K	O	N	T	A	K	T	O
R	T	E	I	E	S	D	D	L
A	B	N	S	T	E	L	O	U
K	U	P	A	C	O	L	J	I
I	L	E	K	R	I	F	E	C
M	T	A	E	R	E	L	T	A
A	E	H	O	F	I	P	I	N
T	N	N	I	T	K	G	S	N
A	O	L	K	P	U	E	A	E
S	E	S	E	F	E	L	E	S

En la enigmo estas kaŝitaj 27 nomoj de diversaj nunaj kaj iamaj esperantistaj organizoj, institucioj kaj E-gazetoj : CED, EKI, ELNA, IFEF, IGA, IKUE, ILEI, IPE, ISAE, ISAKE, KELI, KES, LEEN, SEF, SEL, SES, STELO, TEJOLDO, KONTAKTO, PACO, SAT-AMIKARO, SENNACIULO, SONORILO.

Por trovi la vortojn oni elprovu ĉiujn el la ok sencoj, kaj tiam atente trastreku ĉiun el la trovitaj vortoj (aŭ ĉirkaŭigu ties literojn). Por ne erari prefere uzu la simplan krajonon. Almenaŭ po du literoj de ĉiu vorto (sed neniam ĉiuj) apartenas ankaŭ al aliaj vortoj.

Fine - sen la streko restos nur tri literoj, kiuj ligitaj de supre malsupren donos la nomon de **la plej grava peresperanta laborista Asocio.**

Aŭtoro: Ivan Močilnik

NI RIDU !

ELEKTO

Oni demandas studentinon:

- Kia nokto estas pli agrabla - ĉu novjara nokto aŭ nokto kun viro?
- Kompreneble novjara - respondas junulino.
- Sed kial ?
- Ĝi estas pli ofta - ekspiras malfeliĉulino.

Solvo de la aprila Krucvortenigmo :

Horizontale: se,-riska, -ideal, -danka, -ŝanĝa, -drata, -nacia, -efika, -krede, -decid, -plane, - agada, -pasia, -glora, -neces, -stila, -tromp, -motiv, -frukt, -detal, -tomba, -odora, -honta, -kadra, -prave.

Vertikale (grizaj kvadratoj): **Sennacieca Asocio Tutmonda.**